

ESPERANTO

TRIUMFONTO

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburg.
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gill North, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolono).
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro,
Kaunas (Kovno).

Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura redaktoro: Zanon.

ADMINISTREJO:
Köln Horrem, Rejnlando,
Germanio.
Poŝtĉeka konto Köln 70863
por Teo Jung, Köln-Horrem

Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de l' papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendado aŭ respondo aldonu resp-kup. aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ
ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.

Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administradoj por oficiala letero. — Bibliotekoj, leĝejoj, redakcioj, aŭtoritatoj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne.
3 dolaroj, 7.50 guldenoj, 12 svedaj kronoj, 15 avisaj frankoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norvegaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 35 liroj, 60 finnaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 360 hung. kronoj, 1800 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu duonjare 50 gmk., Rusio 40 gmk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronjare 25 50 mk., aŭ rekte ĉe la administrado Köln Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 2.50 mk.).


ANONCOJ
kostas po cm² (kvadratenmetro) por ĉiuj landoj 3 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCOJ kostas po 2 foja enpresado kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ lialo kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/12 jarabono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/8 jarabono); 1 foja enpresado kostas la saman kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazontoj (ĉefkunsido, fondiĝesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 74 :: Antwerpen, Barcelona, Edinburg, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 5. Marto 1922.

Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.

Jam delonge la germanaj samideanoj akcelis instituton por la tuta respubliko, ĉar oni ne ĉiel povis akcepti kiel kompetentan la jam 1908 fonditan Saksan Esperanto-Instituton. Germanujo ja konsistas el diversaj ŝtatoj, kiuj havas siajn proprajn ministeriojn por lernejoj ktp. Laŭ decido de la „Reichsministerium des Innern“ (Germana ministerio por Internaj aferoj) de l' 2. 2. 22. (III 5881) la ĝisnuna saksa instituto nun estas transformita en germanan instituton kun la titolo „Esperanto-Instituto por la germana Respubliko“. Per tio la laboro de la instituto ankaŭ en aliaj partoj de Germanujo ne plu kuŝas ekster la specialaj taskoj de la instituto. Certe nun ankaŭ la ne-saksaj germanaj samideanoj ekkonos sian devon, morale kaj finance helpi la instituton, ĉar la helpo, kiu estas promesita de la germana ministerio, pro financaj kaŭzoj certe ne povos esti tro granda.

Samtempe en la ministerio estas nomita speciala referanto por Esperanto, tiel ke oni povas esperi, ke per ŝtata helpo la Esperanta movado en Germanujo baldaŭ pli forte marŝos ol ĝis nun, se — la Germanaj Esperantistoj ne forgesas, ke ili per energia laborado devas konvinki la ministerion pri la praveco de ĝia decido.



Panoramo de Salzburg kun la Kastelmonto.

por niaj etaj fortoj, tre malrapide veturigatan inter la tutmonda svarmo kaj popolmiksigo.

Follumu la historion de eltrovoj kaj inventoj, kaj vi miros pro la homara malrapidemo kaj inerteco. Nur tuj utilaj kaj vivnecesaj eltrovoj rapide disvastiĝas; ĉio alispeca postulas longajn jardekojn kaj jarcentojn.

Neniu faru por si iluziojn pri la registara enkonduko de Esperanto. Ĉiu tiaspeca paŝo en lando, kie nia movado ne havas radikojn, alportos pli da malutilo ol profito. Deviga instruo de Esperanto povas fari ĝin malamata de la junularo, malŝatata de la instruistaro, se ne estis jam preparita grundo por tio.

Nur nedevigan instruon ni devas klopodi antaŭ la registaroj, samtempe unuigante niajn fortojn. Ĉar ni estas ĝis nun la solaj vivantaj reprezentantoj de Esperanto, de ni dependas la sorto de la lingvo.

— Sed kiam finfine triumfos Esperanto? Tiun demandon povas proponi junaj kaj novaj samideanoj. Malsamaj aŭdiĝos respondoj de la malnovaj kaj nejunaj Esperantistoj. Post unu jaro! Post tri, kvin, dek jaroj

Ni lasu tiujn antaŭdirajn kaj fantaziajn nombrojn. Ni turnu orejon por unu maljunula voĉo, kiu rakontos al ni pri tiu malproksima tempo, kiam la unuaj Esperantistoj, en la jaro 1888, senbrue kunvenadis en nebula Peterburgo, kiam la tuta Esp. literaturo konsistis el 5-6 libretoj, kiam oni legis precipe Esperantistajn leterojn, kiam oni verkis poezion studente Esperanton, kaj lernis Esperanton, parkerante la versaĵojn!

Feliĉa tempo, kortuŝa simpleco! Feliĉaj estas ni ankoraŭ . . . dum nuna neoficiala ekzistado de Esperanto, kiam oni ne devigas iujn ajn ĝin lerni, kiam oni ne renkontas ĝin sur ĉiu paŝo.

Ho, kreu maljunulon, vi legantoj, elvaporigos Esperanta junaromo, post kiam sekaj oficistoj burokratigos nian lingvon. Ne kuru al matura aĝo, ho junuloj, kaj ŝuu dum estanto floras. La fruktoj venos per si mem, ne rapidigu ilian nature malrapidan kreskadon. Idealo atingita — idealo rompita! Do, vivu ideala Esperanto, ĝi vivu kaj floru libere, senrompe.

P. E. S-n.

Salzburg.

(Kun du ilustraĵoj)

Salzburg, vi belega urbo! Kiu iam vidis vin, tiu jam estas alirita por ĉiam per via admirinda beleco, via ĉarma naturo, per viaj multnombraj vidindaĵoj el antikva kaj nova tempo. La fortikaĵo, iam protektinta la urbon, staras sur monto, meze de la urbo, kaj rakontas al ni pri tempoj jam delonge pasintaj. Ĝi rakontas pri ĉefepiskopoj, la antaŭaj estroj de la urbo, pri sieĝoj, pri kamparaj militoj, sed ankaŭ pri bonaj tempoj.

Malsupren rigardante de la kastelmonto, oni vidas, kuŝantan en la longa Salzach-valo, la urbon kun ĝiaj multaj preĝejoj kaj palacoj, inter ili precipe la belega ĉefpreĝejo de S-ta Petro kun fama tombejo. Oni vidas plue la Maximuskapelon enĉizitan en la rektaj deklivoj de la Mönchsberg (Monahomonto), kiu rememorigas pri la unuaj tempoj de la Kristanismo ĉi tie.

Ĉiu parto de la urbo montras al ni bildojn el aliaj epokoj. Feliĉe kunigitajn ni vidas en Salzburg konstruaĵojn de plej diversa stilo.

Multaj parkoj, aleoj kaj ĝardenoj donas al la urbo freŝan aspekton, kaj ne malprave oni parolas pri la „verda, bela Salzach-urbo“.

La 25. — 26. marto 1922 Salzburg loĝigos la Unuan Sudgermanan Esperanto-Kongreson, kies ĉefa tasko estos la propagando en Aŭstrio kaj sudgermanaj landoj. Estas dezirinde, ke tre multaj samideanoj venos al nia kongreso, kie ili ne nur povos labori por Esperanto, sed ankaŭ ĝui kelkajn belajn kaj gajajn horojn. La kongreskomitato zorgos tiel por laboro kiel por amuzo. Granda ekspozicio montras al neesperantistoj kaj nekredemuloj la progreson de nia afero. R. M.

Kiam Esperanto triumfos?

Aproboj kaj rekomendoj, kiujn laŭte esprimis dum la pasinta jaro multaj gravaj institucioj, nature tre ĝojgis kaj vigligis la Esperantan legataron kaj donis esperon al multaj samideanoj pri la proksima definitiva triumfo. Eble kelkaj personoj, pli-malpli laborintaj en Esperantujo, eĉ atendas baldaŭan ripozon sur la laŭroj! Aliaj naive kredas, ke post kelkaj monatoj Esperanto estos alprenita en la tuta mondo!

Ne, karaj legantoj! Tia animstato estas erara kaj danĝera. Ne ripozon, sed pluan penon, ne laŭrojn, sed novajn luktojn ni bezonas, por sukcese antaŭenpuŝi la Esperantan ĉaron, tro pezan

El la Intima Libro de la Verdurbaj Esperantistoj.

De Ada.

La longaj oreloj.
Mi ne memoras pri kiu verko*) Nietzsche (Nicsĉe) diris, ke ĝi ne estas por la longaj oreloj.

Tiu ĉi penso restis engravurita en mia memoro. — Ĉar ĝi estas taŭga devizo por ĉiu nova movado

Sama estas la sorto de ĉiuj novaĵoj en la mondo: suferi pro la longaj oreloj.

La longorelulo — tio estas la kritikanto en la fabelo de la rusa poeto Krilov pri la najtingalo kaj ĝia juĝisto, la azeno.

La longaj oreloj scias ĉion, ne lerninte ĝin. Ili ĉiam estas pretaj paroli pri ĉio, diskuti, disputi, taksu kaj ridi. Ili ridas je ĉio, kion ili ne konas: alie ili montrus sian nescion.

La longaj oreloj timas la opinion de l' amaso. Tiel ili penas konformigi sin al ĝi. Ili vivas nur kun ĝiaj komprenoj ili ne kuraĝas ekrigardi la novon. Ili rapidas eĉ antaŭ la amaso por deklari sin kontraŭ ĉio nova, al kio ĝi ne estas kutimiĝinta.

La longaj oreloj estas la eterna haltigilo de la homa progreso. Ili ridas la grandegulojn. Ili malhelpas la genulojn. Ili proklamis Kolumbon freneza, ili rompis la unuan vaporspon. Ili metis la dornan kronon sur la kapon de Kristo kaj daŭrigas ĝin metadi sur la kapon de ĉiu reprezentanto de la progreso.

Iliaj okuloj estas malfortaj kaj ne povas toleri la lumon, — kaj ili volas ĝin estingi.

Samideanoj, forgesu neniam: ankaŭ Esperanto ne estas por la longaj oreloj.

*) Pri la ideo de la senŝtateco, en Zarathustra „Pri la nova idolo.“ (Red.)

Testamento.
La unua Esperantisto en nia urbo mortis. Ni ĉiuj ĉeestis dum liaj lastaj minutoj. Li kuŝis malgrasa, pala, kun longa blanka barbo. Liaj okuloj estis fermitaj, lia spirado — peza kaj negala.

Silento regis en la ĉambro. Lia edzino silente verŝadis larmojn apud la lito.

Li malfermis la okulojn, ekrigardis nin per stranga rigardo, jam netere brilanta, kaj ekparolis mallauĉe, malrapide, sed kun inspira voĉo:

„Amikoj, venis mia lasta horo. El miaj manoj falas la verda standardo. Ĝin mi tenadis ĝis nun persiste, per tuta mia forto kaj neniu momenton mi ellasis ĝin. Sed nun — nun mi ne povas plu. Mi tamen mortas trankvila, ĉar mi herede lasas ĝin al viaj manoj — indaj manoj.“

Vi havis la kuraĝon min sekvi sur la malfacila en la komenco vojo. Nur vi ne ektimis la dolorigantajn ŝtonojn, kiuj kovris tiun vojon.

Oni vin ridis — vi ne atentis. Oni vin insultis — vi ridis. Oni vin nomis frenezaj — vi ne ekhaltis.

Indaj estas vi ricevi herede mian standardon. Mi scias, ke vi brave ĝin portos ĝis via lasta horo, kaj mi estas trankvila.

Dum multaj jaroj ni, gefratoj, vivis kune, agis kune, dividis inter ni ĉiujn ĝojojn kaj malĝojojn.

En mia lasta horo mi diros nian komunan eraron en nia agado. Kaj estu miaj vortoj testamento por via plua agado.

Ni agis blinde, fratoj kaj fratinoj, kaj al ĉiu ni proponis nian ideon. Jen tio ĉi estas nia eraro. Tiel agante, ni humiligis nian ideon. Ĉar ni ne konsideris, ke estas homoj indaj kaj homoj ne-indaj por ĝi.

Same, kiel ni ne proponis nian lingvon al bestoj, ĉar ili ne povas nin kompreni, — ni ne

devis ankaŭ proponi ĝin al tiuj homoj, kiuj ne povas nin kompreni. Ne taŭgas por ili nia ideo. Ili vivu sian vivon en sia malvastigita rondo kaj ne venu al nia vojo!

Kiu ne estas kapabla nin kompreni, ne estas inda nin aŭskulti.

Kiu ne estas kapabla ŝati nian perlon, ne estas inda rigardi ĝin.

Jen estas mia testamento:

Ne jetu vane nian semon sur ŝtonon. Ne jetu nian perlon en la koton. Gardu Esperanton kaj ne proponu ĝin al homoj neindaj por ĝi!“

Tio ĉi estas la lastaj vortoj de la unua Esperantisto en nia urbo.

★

La floroj de l' memorado.
(Impresoj de gasto.)

De tri tagoj mi ĝuas la feliĉon esti gasto de la Verdurbaj samideanoj. Leginte la testamentajn vortojn de la unua Verdurba Esperantisto, mi ekvolis nepre viziti lian tombon. Hierau ĉi samideano kondukis min afable en la tombaron.

Freŝa herbo kovras la lokon, kie ripozas tiu ĉi brava kaj dum sia vivo nelacigebla Esperantisto. Verda pino simbolas lian agadon por la Espero. Ĉu tio ne estas la plei bela monumento? — Modesta kruco montras lian nomon.

Apud la tombo estas benketo, kie ni longe sidis, ĝuis la tombaran kvietecon kaj parolis pri la mortinto. Mia samideano-akompananto rakontis al mi multon pri lia imiinda vivado kaj agado. Poste li diris al mi:

„Sed mi devas montri al vi duan tombon, kiu same estas ligita kun la pasinta vivo de ni, la Verdurbaj Esperantistoj.“

Jen ni ekstaris apud tombo modesta. Inter la bela herbo dense ridis multaj, multaj blankaj floroj.

etoj. Sur la surtomba kruco mi legis virinan nomon.

„Ĉu vi vidas tiun ĉi tombon?“ diris mia kondukanto, „en ĝi ripozas samideano, kiun ni memorados je eterno.“

Si estis herolono — alian vorton mi ne trovas por karakterizi ĝin. Mi ne povas sufiĉe bone rakonti, por prezenti entute al vi, kia sindona Esperantistino ŝi estis. Kiel ŝi agis, kiel ŝi kulis por nia afero! Ŝin ni konsideris preskaŭ kiel vestalinnon en la templo de la Espero — tiel esprimis s'an adoron al ŝi la samideano.

Si estis bela. Ĉiuj rimarkadis tion, multaj sopiradis je ŝi. Eĉ multajn ŝi aliris al Esperanto dank' al sia beleco. Al siaj adorantoj ŝi kondukis moke — ĉar ŝia atento estis dediĉita al Esperanto, nur al ĝi! Kaj kvazaŭ ŝi ne rimarkis sian belecon . . . Sed eble ŝi konsciis, ke malatentante ĝin, ŝi fariĝas multe pli simpata.

Vi scias, sinjoro, ke antaŭ kelka tempo ĉiuj Esperantistoj sur la tero festis la kvindekjaran jubileon de Zamenhof. Ni decidis festi tiun tagon per vespera amuzo. Ŝi volis deklami la „Preĝon sub la verda standardo“. — Vi devus esti ŝin vidinta inter ni deklamantan, por kompreni, kiel ŝi povis ravi per sia deklamo. Ŝi parolis kun inspiro kaj donis al ĉiu vorto forton kaj signifon. Pli ol unufoje ŝi igis nin admiri Esperantan parolon.

Do, si estis deklamanta la preĝon de Zamenhof. Sed ĝuste antaŭ la festo — du aŭ tri tagojn — ŝi malsaniĝis. Ne estis grava malsano, tamen ŝi devis resti en la ĉambro — tiam estis vintro, malvarme estis. Ni serĉis jam homon, kiu anstataŭus ŝin en la programo. Sed jen venas sciigo de ŝi: ŝi volas nepre deklami kaj plenumos sian numeron.

Ĉu vi faris ĉion?

por garantii la sukceson de la konferenco en Genève?

Ĉu via ŝtato aŭ via lernejo ministerio aŭ via Esperanta organizacio estos reprezentataj??

Ĉu vi donis fidindajn sciigojn al via landa Asocio, por ke ĝi siaflanke povu utiligi ilin dum la konferenco?

Ĉu vi faris ĉion?

por ebligi al la ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj, doni bonan kompletan kaj precipe fidindan raporton pri la Esperanta movado en via lando?

Ekzamenu vin serioze!

Ne de propagandaj vortoj dependas la sorto de la Esperanta movado en nuna kaj estonta tempo, sed nur de nepre fidinda sciigo pri veraj faktoj! Tial:

Faru tuj vian devon!

Esperantaj kursoj inter militistoj.

de Fr. Prengel,
del. de UEA, Bydgoszcz (Pollando).

De diversaj flankoj demandite pri miaj spertoj ĉe gvidado de Esp. kursoj inter militistoj, mi volas raportante pri tio ĉi samtempe doni kelkajn rimarkigojn kaj de interesigantoj eventuale sekvo-tajn konsilojn. Ĝenerale mi povis konstati, ke interesigi militistojn pri Esperanto estas pli facile ol civilulojn. Tio verŝajne estas sekvo de la enuiga soldata vivo kaj la manko de vere inda distrigo. Tial trovi interesigantajn kurspartoprenantojn estos preskaŭ ĉiam tre facile, kaj oni certe gvidos sukcesplene kurson en privata rondo. Sed tio ne sufiĉas. Oni devas gajni la favoron de la oficiraro, por ke oni ricevu la oficialan permeson instrui Esperanton. Tiun ĉi permeson oni certe ricevos, se oni nur ekiras la ĝustan vojon. Ĉe ĉiu militista formacio (almenaŭ en Pola lando) troviĝas tiel nomata gvidanto de kleriga sekcio (pole „kierownik oswiaty“). Vizitante tiun ĉi sinjoron oni klarigu al li la gravecon de Esperanto por la militistaro, pruvante tion per la multnombraj konatigitaj ekzemploj pri la granda utileco de Esperanto dum la mondmilito, pri la Ruĝa Kruco ktp. La sekvo estos, ke la gvidanto de kleriga sekcio, kies ĉiama devo estas peni disvasti la scion de la soldatoj, interrilatiĝinte kun la gvidanta oficiraro, rekomendas la lernadon de Esperanto al la soldatoj per oficiala dekreto. Tio ĉi lasta okazis ĉe la ĉi tiea militista komando kaj eĉ pli, oni ne nur rekomendis, oni eĉ ordonis la lernadon de Esperanto al la tuta personaro de la komando. Cetere oni rigardis la Esp. instruon kiel oficialan servon, ĉar ĝi okazis dum la servo, nome ĉiusekve de 8—9 h. matene. Krom tio oni ofte ebligis fari propagandoparoladojn. — La propagandon, se tiel eble, oni komencu ĉe komandoj, intendanturoj k. s. organizaj, ĉar tie ĉiam estas personoj iom pli kleraj, kaj tiel ankaŭ la sukceso estos des pli certa. Ĉiokaze la Esp. propagando inter militistoj meritas gravan atenton. Samideanoj-militistoj propagandu Esperanton inter viaj kamaradoj, instruu al ili la Zamenhofan idealon, instruu sindone la paclingvon, kaj el militistoj farigos pacifistoj.

Mi vizitis ŝin, por informiĝi, ĉu efektive ŝi estas sufiĉe sana por povi deklami. Bedaŭrinde ne estis tiel: Ŝi estis malforta pro la malsano, danĝere estis por ŝi forlasi la ĉambro. Tamen decide ŝi diris: „Mi deklamos.“ Ŝia patrino kun larmoj en la okuloj ŝin petis resti en sia lito kaj ne fari tian riskan agon. Ŝi ne estis konvinkita: „Mi nepre deklamos!“

Kiam la patrino eliris el la ĉambro, la malsanulino sin turnis al mi: „Ne admonu min.“ ŝi diris, „mi sentas, ke mi devas fari tion ĉi. Eble — ŝia voĉo nun ekstremitas, sed ŝiaj okuloj ankoraŭ brilis persiste kaj decide — eble tio ĉi estos mia lasta ofero por Esperanto.“

Kion ŝi volis diri? Ĉu ion ŝi efektive antaŭsentis? — Mi ne scias. Sed mi komprenis tiam, ke estus vana plia admonado.

Ŝi donis sian lastan oferon por Esperanto. Ve, tio estis efektive la lasta ofero. Ŝi venis, ŝi deklamis... Sinjoro, mi ne memoras esti aŭdinta iam similan deklamon. Tiun ĉi vesperon ŝi superis sin mem! La salono estis plenplena, oni aplaudis, aplaudis... Ĉiuj estis ravitaj. Mi vidis entuziasmon sur la vizaĝoj de multaj ne-esperantistoj. Al mi ŝajnis, ke mi songas. Kvazaŭ netera, alimonda estaĵo estis veninta inter ni kaj diris profetajn parolojn

Mi akompanis ŝin post la deklamo al ŝia hejmo. La nokto estis hela, sed tre malvarma. Mi kondukis ŝin subbrake. Mi sentis, kiel tremas ŝia korpo. Mi proponis mian supran veston, ŝi ne akceptis.

Ŝi estis feliĉa, kontenta:

„Mi faris mian agon.“

Vento ekblovis. En la altaĵoj ĝi ekkantis super ni funebre. Ĝi portadis kontraŭ niajn vizaĝojn malgrandajn neĝerojn.

Komerco.

La Specimena Foiro de Milano

decidis uzi Esperanton flanke de aliaj, naciaj lingvoj. Jam presigis flugfolioj, en kiuj estas anoncite, ke ĉe la Foiro funkcios servo de Esp. interpretistoj, Baldaŭ la komitato sendos eksterlandan propagandan broŝureton Esperante verkitan.

Komercaj lernejoj.

En Lyon, Franc., s-o Pouchot, prof. en la profesia lernejo „La Martinière“, gvidas komercan kurson en la ejo de la urba lernejo de ekstera komerco kaj reprezentado (kun permeso de la departementa inspektoro de teknika instruado). Alia kurso en la ejo de la lerneja grupo, str. Sergent Beaumont, de s-o Avril.

Subvencio de 100 fk.

ricevis la grupo en Certe, Hérault (Franc.) de la komerca ĉambro. La grupo gvidas kvar kursojn.

La Ĝenerala Sindikato de la Oficistoj kaj Komercvojaĝistoj en Verviers, Belg.

aligita al la „Centrale Syndicale de Belgique“, en ĝenerala kunveno de 12. febr. anoncis malfermon de kurso por la gemembroj, kaj voĉdonis rezolucion favoran al la enkonduko de Esperanto en ĉiuj industriaj, komercaj, sciencaj ktp. medioj.

Stan. Kamaryt, la Nederlanda ministrejo por instruado s-on Sevenhuijsen, prez. de la Tutmonda Asocio de Instruistoj.

La Esperantistaro de Hamburg donacis 500 gmk., Revelo (Rejnlanda Vestfalia Esp. Ligo) provizore donacis 1000 gmk. por la vojaĝo de germanaj delegitoj al la konferenco

En Hatfield (Anglujo)

s-o James Leakey gvidas nedevigan kurson en la porknaba lernejo kaj preparas kelkajn knabojn por teatraĵeto je la fino de l' kurso.

En Milano (Italio)

komencis la 1. febr. la instruado de Esperanto en popolaj lernejoj (5-a kaj 6-a klasoj). Estas la dua jaro, ke la infanoj de Milano lernas Esperanton. — Okaze de la malfermo de unuagrada kurso ĉe la Proletaria Universitato, la 1. febr., d-ro Angelo Filippetti, urbestro de Milano, prezidanto de „Esperanta Domo“, faris efikan paroladon. La lecionojn, kiujn partoprenas 125 gesinjoroj, gvidas s-ano Pietro Rota.

La Ŝtatministerio de Braunschweig

(Brunsvigo) deklaris al demando de deputito Sievers, ke Esperanto estas rekomendata kiel nedeviga instrufako ĉe la pli altaj lernejoj de la

En Arnau (Ĉeĥoslovakio)

s-o prof. Truntschka komencis kurson kun 38 partoprenantoj en la urba Esp. lernejo.

En Southend (Britlando)

s-o Elvin sukcesis favore decidigi la lernantulan „parlamenton“ de la Liceo pri projekto, laŭ kiu oni instruu Esperanton estonte en liceoj.

Germanlando.

La 9. febr. komenciĝis en la Popola Altlernejo de Hagen la dua Esp. kurso de tiu ĉi vintro kun 25 partoprenantoj. Gvidanto: s-o Rose.

En Verviers, Belg.

la 9. febr. parolis s-o Parotte en ĝen. kunveno de „Cercle Pédagogique“ antaŭ ĉ. 40 p. Tiu ĉi organizajo okupiĝis baldaŭ mem pri aranĝo de kursoj por la ĝeinstruistoj kaj pri klopodoj por enkonduko de Esperanto en la lernejoj de la urbo kaj ĉirkaŭaj komunumoj.

Oficialaj Sciigoj

pri la

Sciencaj Organizacioj.

(Komparu ET n-oj 63, 66 kaj 70.)

La hodiaŭa ŝtato de la aliĝintoj estas: 350 el 33 diversaj landoj de ĉiuj kvin kontinentoj. En tiu nombro ne estas entenataj la sinanoncintoj ĉe plejmulto de la komitatanoj niaj kaj TEKA-konsuloj. Tiun bonan sukceson ni dankas al niaj agemaj komitatanoj kaj anoj; ankaŭ granda helpo estis por mi, ke mi povis kompletigi mian adresaron de sciencistoj esperantistaj per sciencista listo afable sendita de UEA (Genève).

Jenaj novaj aktivaj komitatanoj estas diskon-igindaj:

S-o Rollet de l' Isle, 35 rue du Sommerard, Paris 5 por Franci.

(bedaŭr. forgesita en la antaŭa raporto)

S-o prof. Henriko Legrand, Larranaga 140, Montevideo por Urugvajl.

S-o prof. Krestanoff (forlasanta Bulgari.) estas anstataŭata per

S-o prof. Atan. Atanasov, Oborište 44, Sofia.

Nun venis la tempo de la plenumo de niaj devoj: Ni liveros la Revuon ktp. kaj la abonantoj liveru la monon! Bedaŭrinde okazis kelkaj malfacilaĵoj (precipe la striko de la fervojoj), kiuj prokrastis la aranĝon de la voĉdonado (de la Komitato) pri la eldonejo. Sed kiam ĉi tiu numero estos en la manoj de la legantoj, la voĉdonado jam estos decidita, kaj la 1-a numero certe eliros komence de aprilo.

La komitatanoj (komp. n-o 66 de ET) kaj la TEKA-konsuloj estas jam nun komisiitaj kaj rajtigataj akcepti la kotizojn por M. kaj MA. (sed ne por nuraj abonantoj!), kompreneble ankaŭ donacojn por la Int. Sc. Asocio. Ili donos al la pagantoj kvitancon. La pagantoj aldonu moneton por la sendaj elspezoj de la landaj konsuloj resp. komitatanoj, kaj ni proponas aldonon samvaloran al eksterlanda leterafranko. La konsuloj akceptas la monon ankaŭ per ĉeko ktp.

La alvoko en ET n-o 70 de d-ro Róbin ebligis konfuzon pri la alteco de la kotizoj. Tutkompreneble ni ĝojus, se tre multaj TEKA-anoj ankaŭ el malbonvalutaj landoj pagus sumon egalan al 10 fr. sk. (sed ni devas fiksi, ke la bonvalutuloj certe minimume pagu la kotizojn starigitajn de ni. La troa sumo rilate al nia fiksita kotizo estos transpagata al la TEKA-kasisto. Tion precipe la bonvalutanoj atentu.) Ni devas resti sur tiu bazo (kiu ja nur valoras en 1922) pro niaj kontraktoj kun la eldonejoj.

ŝtato. Post tio anoncis sin 14 instruistoj, 279 lernantoj kaj 20 lernantinoj por la kursoj. La enkonduko de Esperanto ĉe la popollernejoj estas provizore prokrastita, ĉar la necesaj instrufakoj tute plenigas la instruplanon kaj la enkonduko de fremdlingva instruado postulus alligon de la instruplano.

La ŝtato Braunschweig donis subvenciojn de 500 mk. al la Esp. Grupo Braunschweig, 160 mk. al la Laborista Grupo kaj 90 mk. al „Verda Stelo“. Krome la ŝtato Braunschweig aliĝis al la Esp. Instituto por la Germana Respubliko kun jara kotizo de 1000 mk.

En Buer (Vestfalia, Germ.) finiĝis kurso ĉe la popola altlernejo kun 21 p. Fondiĝis grupo. — En Hirschfelde kurso por 17 knaboj. — La urba estraro de Riesa decidis, je Pasko enkonduki la nedevigan Esp. instruadon en la popollernejoj.

La urba konsilantaro de Dresden permesis la aranĝon de privataj nedevigaj Esp. kursoj ĉe la urbaj perfektigaj kaj popolaj lernejoj.

Karnavalo en Rejna urbo.

Kvankam la nunaj cirkonstancoj malpermesas al la Rejnlandanoj, festi karnavalon konforman al malnova tradicio kaj Rejna moro, tamen nenio riproĉinda estas en tio, ke kun melankolio kaj samtempe ĝojo ili rememoras pri la tempo, kiam homoj junaj kaj maljunaj, malgrandaj kaj grandaj, riĉaj kaj malriĉaj ovaĉis al la princo Karnavalo. Precipe vigla la karnavala agado estis kompreneble en urboj de Rejnlando, ne lastavice en Koblenzo.

Jam en pli antaŭaj jarcentoj oni konis ĉi tie la farsecon kaj festis karnavalon laŭ certa maniero. Sed la konfuzoj sekve de la granda revolucio fine de l' 18-a jarcento kaj la tiamaj kaj postaj militokazaĵoj devige forpelis la inklinojn al karnavalaĵoj. Nur ĉirkaŭ la jaro 1824 reekvigligis la karnavala ideo en Koblenzo, kaj la aranĝaĵoj de tiu jaro estis la impulso al la grandaj popolfestoj en postaj jaroj. Sed la tiamaj estraroj de la urbo havis nur malmultan komprenon por la Rejnaj popolkutimoj; en 1825 la polico eĉ kolektis maskimposton de 3 argentogroŝoj de ĉiu, kiu maskita pasis la straton. Tamen de tiam la karnavalo estis festata pli aŭ malpli grandioze dum 90 jaroj, ĝis kiam la mondmilito, kiu ja multon forbalais el la mondo, forpuŝis ankaŭ la karnavalon. — Do por ne tute forgesiĝi unu el la plej belaj Rejnaj popolkutimoj, jen mi rakontos la karnavalajn okazaĵojn de unu jaro, de 1839.

La karnavala tempo ofte jam komenciĝis per torĉa procesio porinfana je la antaŭvespero de S-ta Marteno (11.11.). Tiam okazis ankaŭ la unuaj kunsidoj de la karnavalaj societoj. Nu, en 1839 ekregis vigla porkarnavala entuziasmo en ĉiuj soclrondoj. Estiĝas procesio, kian Koblenzo


ne vidis ĝis tiam. La programo citas 137 numerojn. La maskoproceso bazis sur la ideo: „Transmigrado de kolonio el la luno al Koblenzo.“

Jam je la „grava jaŭdo“ (j. antaŭ la karnavala festo) „princo Momus“ — kiel oni tiam titolis la petolegan princon — estis venigata el „Lützel-Koblenz“ (antaŭurbo trans Mozelo) kaj akompanata de festa procesio el la urbo Koblenzo.

Antaŭe oni baris — t. e. fermis per papero — la transan pontopordegon kaj okupis ĝin per dekdukapa gardantaro, konsistanta el filistoj kaj hipoondriuloj, kiuj malhelpu la eniron de la petolega princo al Koblenzo. Supre post la balustrado de la pordego troviĝis la urba artilerio sub la komando de la urba kanonisto.

Precize je la sepa horo ekmoviĝis la procesio, gvidata de la petolega marŝalo. Ĉi tiun sekvis zro da rajdantaj mezepokaj soldatoj, kiuj havis la taskon, kurpreni la pordegon kaj kapti la gardantaron. La procesio unue estis akceptata per ĉion surdiganita pafado de la gardantaro kaj de la urba artilerio, sed baldaŭ la pordego brulis helflame. La gardantaro estis kaptata kaj metata sur bovoveturilon, por esti transportata en la procesio Koblenzon. Nun moviĝis la procesio en torĉolumo kaj kun muziko trans la ponto al la urbo. „Princo Momus“ kun du el siaj akompanantoj troviĝis en kvarĉevala kaleŝo, programane direktata de la poŝestro. La aliaj procesianoj surhavis plejparte la belvestan beduenkostumon kaj portis peĉtorĉojn. La procesio moviĝis unue al la Planplaco, kie la princo estis salutata de la ĉefurbestro. Poste ĝi pasis la ĉefajn stratojn kaj disigiĝis antaŭ ŝatata trinkejo.

Je la karnavala dimanĉo okazis nur kafovizitoj, baloj kaj teatraĵoj, kies titolo estis „Arlekeno en la kafomuelilo“. Lunde oni havis popolamuzikaĵojn. Fine, je la karnavala mardo, oni okazigis la grandiozan



Salzburg. — Mirabell-Gardeno.

Lernejo.

La Konferenco por Esperanto en Lernejoj

okazos laŭ „Esperanto“ la 18.—21. aprilo en Komisiona Salono de la Ligo de Nacioj. Pedagogia ekspozicio de Esp. lerniloj (murtabeloj, libroj, ludiloj, statistikoj, kajeroj, geknabaj skribaĵoj kaj poŝikartoj) estos organizata ĉe la Instituto Jean-Jacques Rousseau, Taconnerie 5, Genève. Ĝeinstruistoj bonvolu helpi per alsendo de interesaj montrindaĵoj.

Ĉe la konferenco estos reprezentataj la Brita Esp. Asocio per sep oficialaj reprezentantoj, la Skota Federacio per du, la Jorkŝira Federacio per f-ino Morton, la Lankaŝira kaj Ĉesira Federacio per du. La Germana Esp. Asocio delegos sian prezidanton d-ron Steche kaj la direktoron de la Germana Esp. Instituto d-ron Dietterle, la Centra Dana Esp. Ligo s-on Carlsen, komercan lernejestron, f-inon Asta Mikkelsen, instruistilon, kaj f-inon Astrid Rybo, lernejan vic-inspektoron, la Ĉeĥoslovaka ministrejo por instruado d-ron

Mia kunrantino subite malĝoĝiĝis kaj per pene ŝercema, sed tremanta voĉo ŝi elparolis:

„La naturo volas plori“

Ŝi mortis, sinjoro. Tiu ĉi nokto forrabis tute ŝian sanon.

Antaŭ sia morto ŝi kunvokis nin, petis la Intiman Libron kaj enskribis testamente la versojn de la itala poeto Steketti:

Aŭtune, kiam foje vi migrados
Al mia tombo eble kun doloroj,
Vi ne malĝaja, sola ĝin trovados,
Ĉar tie kreskos multaj belaj floroj.

Ornamu vin per tiu lasta dono,
Per tiuj floroj de la tomba ŝtono.
Ĉar ili estas kantoj neskribitaj,
Paroloj de koramo nediritaĵ.

Ŝi tre amis tiun ĉi versajon, kaj pli ol unu fojon dum sia vivo ŝi deklamis ĝin en nia kunejo.

Vi vidas, sinjoro, ke efektive sur ŝia tombo floras multaj belaj floroj. Por ni tiuj ĉi floroj havas la saman signifon, kiun la verda stelo. Ili ĉiam memorigas al ni pri la heroa sindoneco de la Esperantistoj... Ni nomas ilin „la floroj de l' memorado“. Kiam vi venis en nian urbon, ni proponis al vi malgrandan bukedon — ĉu vi memoras? Ĝi enhavis tri floretojn de l' memorado, ŝiritajn el tiu ĉi tombo

Mia kunlaboranto ĉesis. Longe ni ambaŭ staris en silento, ĉiu meditante por si pri la sinoferado de la heroino. La suno jam tuŝis la horizonton por subiri. Ne kuraĝante paroli, en ia solena adoro, ni ekpaŝis inter la longaj ombroj de la surtombaĵ ŝtonoj al la tombara enirejo

Mi gardos, mi ĉiam gardos la tri floretojn de la memorado, prenitaĵn el la heroina tombo.



Krome ni sendos al ĉiuj aliĝintoj en kelkaj tagoj presajojn entenantajn la liston de la kotizoj kaj de la monakceptantoj ktp.

Kore ni petas, ke ĉiuj aliĝintoj varbu minimume po 1 novan adepton. Kiel signonta ĉefredaktoro mi petas ankaŭ la alsendon de multaj manuskriptoj. La diverseco de la enhavo dependas de la kunlaborado de la legantoj.

Al kelkaj korespondantoj! Bonvolu ne ĉagreniĝi, ke mi ne tuj respondis al vi! La laboro ĉi amasiĝis en la lasta tempo, ke mi ne povis. Riesa, la 23-an de februaro 1922.

D-ro Walter Döhler, sekretario.

Tria kvitanco.

(Januaro 1922)

de libervolaj donacoj por la aranĝaj laboroj.

2. Rosenhauer, Grossenhain	15 gmk.
6. Beran, Leitmeritz	30 gmk.
6. Nederström, Orismala	25 fmk.
7. St. Paul-Illyre, Berlin	40 gmk.
8. Archdeacon, Paris	20 fr. fk.
9. Thorbjörn, Ostervraa	2 dan.kr.
10. Papenthin, Halle	10 gmk.
11. Blazek, Olomouc	20 ĉsl. kr.
11. Thorsteinsson, Reykjavik	250 gmk.
11. Gieswein, Budapest	200 hkr.
12. Vörös, Budapest	100 gmk.
13. Kamaryt, Bratislava	100 ĉsl. kr.
13. Siegel, Unterlauter-Koburg	20 gmk.
16. Favacchio, Modica	5 lir.
16. König, Miskolcz	50 hkr.
17. Guériff, Surbiton	10 ĉil.
19. Madlener, Gaustadt	10 gmk.
20. Sakowicz, Nowogródek	100 gmk.
20. Withe, Vancouver	2 dol. k.
22. Meazzini, San Giovanni	20 lir.
22. Ribas de Pina, Palma de Mallorca	5 fr. fk.
23. Aron, Königsberg	50 gmk.
23. Nowell, Northwich	10 ĉil.
24. Kaspar, Eibiswald	100 kr. aŭ.
27. Haine, Ruysbroek	20 b. fk.
31. Elten, Hildesheim	20 gmk.

Koran dankon al ĉiuj!

Alvoko al la instruistoj!

La estraro de l' Esperanto-Vereinigung Deutscher Lehrer (Esp. Unuiĝo de Germanaj Instruistoj), kiu entenis laŭ oficiala sciigo je la 31-a de dec. 1921 entute 287 membrojn el ĉiuj partoj de Germanlando kaj de ĉiaj lernejoj, priitaktis en la lasta tempo plurfoje la staton de la internacia instruista kaj pedagogia movado.

Ĝi opinias, ke la nuntempa Int. Asocio de Instruistoj kaj ties organo, la Int. Pedagogia Revuo, ne povas esti vivpovaj pro la tutmonda malbona ekonomia stato.

Ĉi tiu dubo certe ne nur estas la nia; alimaniere ne estus klarigebla, ke la I. A. I. nur havis eĉ antaŭ la milio ĉ. 100-200 membrojn (kiom nun, ni ne scias), kvankam la Esp. movado inter la instruistaro estas ĝojge vigla, kiel ankaŭ montras, ke nia kunveno en Praha estis la plej bone vizitata inter ĉiuj fakkunvenoj (preskaŭ 200 partoprenantoj!).

La estraro de Esp. Ver. Deutscher Lehrer decidis:

1. rekomendi en la venonta ĉefkunsido, kiu okazos dum la Germ. Esp. Kongreso en Breslau ĉi tiun jaron, la korporacian aliĝon al la bone progresanta Int. Scienca Asocio, en ĝi kunformante Pedagogian Sekcion;
2. rekomendi jam nun al siaj membroj kaj al ĉiuj eksterlandaj instruistoj kaj instruistaj unuiĝoj, ke ili anoncu sin ĉe tiu Asocio, petante la registrigon al la Pedagogia Sekcio.

maskoprocesion, kies programo, kiel supre dirite, enhavis 137 numerojn kaj la buĉistogildon. Posttagmeze je la 2-a sur la kastelplaco la ĉefurbestro de Farsurbo en la fronto de siaj ĝajaj Farsurbanoj atendis la fremdajn naciojn kun la kolonianoj el la luno, por saluti kaj akcepti ilin plej kore. La ĉefgeneralo de Lia Petolega Moŝto kaj gvidanto de la procesio, akompanata de siaj adjutantoj, ĉiuj en ĥinaj kostumoj, sekvata de „janiĉara orkeŝtro“, same ĥinoj, aperas la unuaj ĉe la kastelo. Ĉi tiujn sekvas giganta kvaronluno kun kvar ĉevaloj, ĉirkaŭata de aro da malgrandaj lunoj kaj steloj. Poste venas diplomato el la luno kun siaj akompanantoj, same en kvarĉevala kaleŝo. Muzikantaro el la „lakta vojo“ (galaksio), maskita kiel steloj, kiujn sekvas giganta kometo kun vosto, loĝata de ĉielgentoj. Astronomo de la promontoro de Bona Espero kun kelketaĝa teleskopo kaŭzas miron. Post la dua muzikantaro, maskita kiel kantobirdoj kaj gvidata de la orkestrestro kiel papago sur ĉevalo, preterveturas la malnova bombosolida kanono „birdo grifono“ de la supera Ehrenbreitstein*) (fama fortikaĵo trans la Rejno), kiu konstante jetegas florojn sur la publikon kaj estas funkciligata de bravaj kuglosolidaj artilerianinoj. Tria muzikantaro en kostumoj de ranoj ĉevalrajdas. Poste venas la standardo de la societo „En la ĝoja konsilantaro“, ĉirkaŭata de la surĉevala kortegano de la princo, kaj nun la veturilo de la „princo Momus“, reprezentanta grandegan konkon, en kiu troviĝas la kortego de Lia Petolega Moŝto. La veturilon akompanas la kavaliroj Hugo de Disporto, Kuno de Hazenporto, Mejnardo de Koberno kaj Ewald de Bertrio. Inter la sekvantaro de l' princo troviĝas la kortegaj medicinisto, poeto, arlekeno, bardoj ktp. Post ĉiu sekcio paŝis kelkaj urb- aŭ mond-

Laŭ intertrakto kun s-o d-ro Döhler, sekretario de la Komitato por la novstarigo de I. S. A. kaj I. S. R., la pedagogia sekcio ricevos ampleksan liberecon de memorganizo kaj ankaŭ parton de la M.-kotizo, sufiĉan por energia laborado. Ĝis la definitiva aranĝo la subskribinto provizore funkcios kiel sekcia sekretario-kasisto.

Nur unuigitaj ni prosperos!

Interkonsente kun la estraro de E.-V. D. L. la kasisto: *Franz Thiel*, Dresden 29, Weidentalstr. 20.

* * *

La supran alvokon mi tutkore salutas kaj subskribas. Rilate al mia raporto en la ĉi sama numero, mi petas jam nun kune kun la aliĝo sendi la kotizojn por M. kaj MA. (sed ne por A.) al la landaj komitatoj aŭ TEKA-konsuloj, kiuj zorgos por transpago al la kasisto, resp. al la eldonejo.

Obstine antaŭen!

D-ro Walter Döhler,
Riesa (Elbe), Germanlando.

* * *

En la venonta numero bonvolu trovi la II-an komunikon de TEKA kaj alvokon de d-ro A. Stromboli por ITA (Internacia Teknika Asocio), por kiuj bedaŭrinde ne estis loko en la hodiaŭa numero.

Poŝto.

En Plzen (Ĉeĥoslovakio)

32 gepoŝtistoj vizitas Esp. kurson aranĝitan de Lidova Universita Husova (Instruanto B. Tittl).

Laboristaro.

En Milano, Riparto Bovisa (Italio)

estas starigita lab. grupo „Nova Homaro“, al kiu aliĝis pli ol 40 gesamideanoj. Je 14. febr. s-ano Umberto Valli malfermis unuagradan kurson kun 40 partoprenantoj. Adreso: Esp. Grupo „Nova Homaro“, ĉe Circolo Familiare, Riparto Bovisa, Milano.

En Köln (Germ.)

s-o Hurler gvidas kurson por 15 sindikat-oficistoj.

Foiro.

Okazontaj Foiroj kaj Ekspozicioj.

- 1.-15. marto Internacia Printempa Foiro de Lyon.
- 5.-11. marto Printempa Specimena Foiro de Leipzig.
- 7.-13. marto Ekspozicio de nutraĵoj k. s. en Dijon.
10. marto ĝis 31. julio Internacia Paka kaj Industria Ekspozicio Tokio.
- 12.-19. marto IV-a Specimena Foiro Praha.
- 15.-25. marto Internacia Specimena Foiro Barcelona.
- 19.-23. marto Printempa Foiro Breslau.
- 19.-25. marto Printempa Foiro Wien.
- 19.-27. marto II-a Specimena Foiro Poznan.

Fervojo.

En Torino kaj Mantova (Italio)

la Esp. Movado inter fervojistoj estas vigla. En Torino ĉe la Rondo de la Fervojistaj Vojaĝistoj (Via Silvio Pellico 1) post parolado de s-o B. Broglio kaj s-o Franco Ramolfo, prez. de „Esp. Fervojista Unuiĝo“, oni fondis novan „Vojaĝistan Grupon“. Ĉiuj ĉeestantoj rekonis de granda utileco la enkondukon de Esperanto ĉe la fervojistoj apartenantaj al la vojaĝa servado, pro la oftaj kontaktoj kun fremdaj vojaĝantoj. Kurso komenciĝis. — En Mantova s-o Umberto Toni gvidas kurson al 22 kolegoj ĉe la Fervojista Rondo.

konataj personoj, ekz. Vilhelmo Tell, Till Eulenspiegel kun sia tuta parenco, eĉ sia avino, ĉiuj sur ĉevaloj, ankaŭ la kantonestro Gessler el Svico kun grupo da svicoj en malnova kostumo, Romeo kaj Julia, la kelisto k. a. — Baldaŭ sekvis la buĉista gildo en kostumoj kun siaj malnovaj gildostandardoj. Ili kunkondukis grandegan virbovon kaj belegan porkon, kiu estis transportata sur veturilo. La kornoj de la virbovo estis ornamitaj kaj la hufoj nigre lakitaj. La procesio trapasis la plej multajn stratojn de la urbo kaj dissolviĝis antaŭ la teatro, kie vespere okazis granda festbalo.

El ĉi tiu rakonto evidentiĝas, ke jam antaŭ multaj jaroj en Koblenzo oni bone sciis festi karnavalon.

Je la „cindra merkredo“ la karnavalo trovis sian finiĝon. Tiam oni portis pallopupegon sur la Mozel-ponton kaj jetis ĝin brulantan en Mozelon. Per granda haringomangado, kiun partoprenis la ĉefurbestro kun kelkaj konsillistoj, oni finis la karnavalon en la jaro 1839.

— — — — —

Kiel rakonto el fabela lando nun ŝajnas al ni Rejnlandanoj, kiam ni legas aŭ rememoras pri tiuj pompaj popolfestoj. — La paco ne povis revekigi ĉe ni la alie tiom viglan princon Karnavalo, kaj tial li dormas dormadas ĝis pli feliĉa tempo.

Laŭ artikolo de *Josef Eisenach*.
Leono Funken.

Diversaĵoj.

Pri la efektiviĝo de la okhora labortago.

De la Internacia Labor-Oficejo ni ricevas jenan oficialan sciigon:

En la gazetaro de Germanujo kaj Svisujo troviĝas sciigoj, laŭ kiuj la plenumo de la leĝo

Mallongaj Esp. Sciigoj.

(Rim. de Red. — Pro la manko de loko ni devias tre mallongigi la alsenditajn raportojn. el kiuj kelkaj povos aperi nur en venonta numero.)

Nord-Orienta Esp. Federacio de Nord-Anglio

havis sian ĵaran aferan konferencan la 18. febr. en Temperance Institute, Newcastle-on-Tyne. S-ino Wright prezidis la reprezentan kunvenon, la fed. sekr. s-o Murray raportis pri la laboro de la Federacio, skizis la historion de ĝia fondiĝo je 31. jan. 1920, multe pro la persistaj laboroj de s-o Geo. Shepherd, kaj ankaŭ menciis la lastajn konferencojn dum 1921 okazintajn en Wallsend, Gateshead kaj Ryton, ktp. La kasisto s-o Raine montris saldon de 1-5-6 sterl. pd. Poste elekto de novaj oficistoj. Post la afera kunveno bonega te-maĝo; vespere dancoj, salonludoj kun Esp. kantoj. S-o Fairbairn ridigis la ĉeestantaron per rakonto por la ludo „Familia Kaleŝo“. Tiu ĉi kunveno estis la plej bona ĝis nun okazinta.

(G. S.)

En Britujo

fondiĝis novaj federacioj: Sudorienta F. kaj Sudokcidenta F.; novaj grupoj en Altrincham, Hyde (Cheshire), Clitheroe, Gillingham, London (Dimanĉa Rondo kaj Esp. Skolta Klubo) kaj Salisbury. Grupoj fondotaj en Farnborough kaj New Barnet. Du kursoj (komenca kaj progresiga) en Brighton, unu en New Barnet, unu sur ŝipo „Cormorant“ (gvid. s-o E. B. Johnson).

Franclando.

Dank' al s-o Decourt, prof. en la liceo Michelet en Paris, fondiĝis Esp. grupo de fraŭlinoj „Juneco“. Sekr. f-ino Suzanne Bekuwe, 127 Bd. Voltaire. — La 15. febr., dum publika kunveno de la Internacio de Junuloj por la Ligo de Nacioj, s-o Archdeacon, inter aliaj oratoroj, parolis pri Esperanto.

Italio.

Novaj grupoj en Milano („Paco kaj Laboro“), Albiolo (Como) kaj Sestri Ponente. En Venezia paroladoj kaj kursoj ĉe Kultura Rondo por la Laboristoj, plue kurso de f-ino Bozzato al lernantinoj de la komunuma popola kurso.

Ĉeĥoslovakio.

Esp. Grupo Trautenau havis sian ĝen. kunsidon la 7. febr. En Trautenau nun funkcias kvar malgrandaj privatkursoj. La 28. jan. okazis amuza vespero kun paroladoj, prezentado kaj danco.

Nederlando.

La 16. febr. lumbilda parolado de s-o Isbrücker en kunveno de „Nederlanda Turista Unuiĝo“, sekcio Hago, pri Esperanto kaj la vojaĝo al la kongreso de Praha. Ĉeestis ĉ. 100 personoj, inter ili la ĉeĥoslovaka ambasadoro, kiu mem estas malnova Esperantisto, la ĉsl. konsulo kaj la ambasadora sekretario. Dudeko da personoj enskribigis sin por nova kurso.

Germanlando.

La Esp. Unuiĝo Dresden nun havas ĉ. 550 membrojn. — Novaj kursoj en Gross-Schönaŭ (28 p.), Hagen (18 p.), Halle (10 p.), Helmstedt (28 p. kaj 5 instruistoj), Hirschfelde (15 p.), Holzminden (16 p.), Jena (18 p.), Karlsruhe (55 p.), Leipzig (40 p.) ktp. — Vidu ankaŭ sub „Lernejo“!

Jugoslavio.

„La Provo“, febr., raportas pri nova kurso en Zagreb (58 p.). En Ljubljana kurso en la komerca lernejo kaj alia en instituto de blinduloj. Esp. vivo revigligiĝis aŭ komenciĝis en Bakar, Banjaluka, Caprag, Virovitica, Krapina, Subotnica kaj Polega.

Italio.

En Legnano apud Milano d-ro Filippetti per propaganda parolado malfermis, la 26. febr., unua-

pri la okhora labortago en Polujo estas prokrastita por la daŭro de du jaroj, dum kiuj entreprenistoj kaj laboristoj havu la eblon intertrakti pri la pliligo de la ĉiutaga labortempo ĝis 10 horoj.

La reprezentanto de la Pola registaro ĉe la administracio de la Internacia Laboroficejo sciigis al ĉi tiu oficejo, „ke la gazetosciigo tute ne havas iun bazon, kaj ke la nova leĝo pri plibonigo de la financoj, kiu kaŭzis la famon, ne enhavas artikolon pri iu aliĝo de la leĝo pri la okhora labortago“.

(Ni petas niajn legantojn, ke ili traduku ĉi tiun oficialan sciigon en sian gepatran lingvon kaj enpresigu ĝin en naciaj gazetoj. Ekzemplerojn de gazetoj kun la artikolo ni petas sendi al ni, por ke ni povu raportu pri tio kaj sendi la kolektitajn gazetojn al la Internacia Labor-Oficejo. — Red.)

Pro eldonado de la

Karnavala Numero

(kiu estas ankoraŭ liverbla por duobla prezo) bedaŭrinde prokrastiĝis multaj interesaj artikoloj destinitaj por la numero de 26. februaro, kaj ankaŭ en la hodiaŭa numero la loko mankis por diversaj artikoloj kaj eĉ anoncoj, kiuj aperos nur en la venontaj numeroj de 12. kaj 19. marto.

Se vi bezonas

ĝisnuaajn numerojn de ET por propagando, ni liveras al vi de la numeroj 55-64

30 diversajn kun rabato de 50%

50 diversajn kun rabato de 60%

je la nunaj prezoj. Mendu rapide, ĉar la provizo ne plu estas granda.

gradan kurson, kiun gvidas f-ino Domènica Pomarici. F-ino Pomarici ankaŭ klopod is fondi grupon en Legnano.

Vidu ankaŭ la rubrikojn „Lernejo“, „Laboristaro“ kaj „Komerco“!

* * *

Pri la Esp. movado en Norvega, Aŭstra, Hungara, Latva, Estona kaj Rusa landoj ni raportos en nia venonta numero. Ni nun pripensas vojon, kiamaniere aranĝi kompletan ĉiusemajnan kronikon pri nia movado tutmonda kaj aranĝi ĝin tial, ke ĝi estu facile kaj oportuna trarigardebla kaj tamen ne okupu tro multe da loko. Espereble ni trovos baldaŭ konvenan solvon.

Skoltoj.

Skolta Esp. Grupo fondiĝis en Madrid, Hispanio. Adreso: str. Martinez Campos 26.

Recenzejo.

LIBROJ.

TRADUKOJ DE FRANCAJ POEZIOJ KUN TEORIO DE NOVA VERSFARADO. Verkita de J. Balliman. 22 pg. 15 1/2 x 12 1/2 cm. Paris, Esp. Centra Librejo, 51, rue de Clichy. Prezo: 2 fr. fk.

La aŭtoro verkis sian libron precipe por francoj, t. e. ne pro la traduko de francaj versaĵoj, sed pro tio, ke li komparas la francajn kaj Esperantajn lingvojn donante klarigojn pri la nova, de li elpensita metodo de versfarado. Koncerne la poeziojn li elektis tiajn de Ronsard, Malherbe, Regnier, Lafontaine, Voltaire, Victor Hugo k. a., tre plaĉajn kaj bonege traduktajn. — Mi mem ne estas poeto, sed mi tre ŝatas belformajn poeziojn, t. e. belformaj en sia senco, ke oni nek dishakis nek senvoŝtigis la vortojn. Por mia orelo tial kripiligitaĵoj estas muzikaĵo. Kaj jen la ĉefa novaĵo trovita en la reformita rima metodo de l' aŭtoro: li tute ne forstrekas la vortajn finaĵojn. En lia versfarado la elparolado estas tute gramatika. Do ne plu estas necese koni versfaradon por elparoli la ritmon kiel en aliaj metodoj, ĉar ritmo devenas nur de la elparolado. Pro manko de loko mi ne povas doni kompletajn klarigojn pri ĉi tiu metodo: al mi ĝi ŝajnas taŭga kaj linitita. Niaj poetoj en Esperantujo agos bone, se ili havigos al si la verdan broŝuron por funde konatiĝi kun la teorio de nova versfarado. (G. Ajul.)

ANNEXE AU RAPPORT SUR LA LANGUE INTERNATIONALE ESPERANTO (mis à jour de 1919 jusqu'à fin de 1921). 10 pg. 25 x 27 1/2 cm. Paris, januaro 1922. Société des Amis de l'Espéranto, Centra Oficejo Esp., 51, rue de Clichy. Prezo 0,75 lk.

Naĉapitra broŝuro priiraktanta la evoluson de la Esp. movado de 1919 — 1921 kaj donanta detalaĵojn informojn pri Esperanto kaj la nova situacio de Eŭropo, la internaciaj kaj naciaj kongresoj de Esperanto, la publika institucio, la scienco, la komerco, la industrio kaj Esperanto, la publika instruado de Esperanto kaj ĝiaj internaciaj organizaĵoj. Konkluda resumo pri la stato kaj progreso de la Esperanto-movado finas la france verkitan broŝuron, kiu reprezentas bonegan statistikon. (G. Ajul.)

ZWEITE HEIMAT (Dua hejmlando). Sekvo de „Schriften des Frankfurter Messians“.

Tiu ĉi broŝuro enhavas sur 40 paĝoj tri (germanlingvaj) artikolojn pri la elmigranta problemo. Interesuloj povas ĝin havigi al si por 10 gmk. de Messian (Poir-Oficejo), Frankfurt a. M.

AFIŝOJ, PROSPEKTOJ, ktp.

IV-A INTERNACIA FOIRO DE PRAHA, 12-19 marto 1922. Tre efika afiŝo (62 x 95 cm) multekolora; ĝi prezentas Merkurion, la dion de la komerco, kiu, tenante laŭrobranĉon, rigardas la entreĵojn al la foirejo.

GAZETOJ.

Internacia Komerca Revuo, Jan. Amerika Esperantisto. Jan. Adr.: West Newton 65, Mass., Usono.

Esperanta Finnlando, Jan. Esperantisky Zpravodaj, Jan. La Espero, Jan. Adreso: Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, Sved.

Nova Tagiĝo, Jan. Hispana Esperantisto, Jan. Nova Eŭropo, kun Ĉeĥoslovaka Gazeto, Jan.

LETERVESPERON, por havigi al la kursanoj korespondantojn, aranĝas Esp. klubo „La Stelo“, la 1-an de aprilo 1922. Sendu iuj leterojn kaj kartojn al f-ino Maria Sandberg, Asgatan 26, Eskilstuna, Svedujo, aŭ al s-o Erik Nilsson, Bergsgat 22, Eskilstuna, Svedujo. Ĉi nepe havos respondon!

Por „Esperanta Ligilo“

alvenis pluaj donacoj:

189. E. Leu, Fürth 12 gmk.; 190. Prof. Christaller, Stuttgart 6.25 gmk.; 191. Esp. Societo Zürich 10 sv. fk.; 192. Aplech Esp. Grupo, Sabadell 5 pes.; 193. A. Holman, Almelo 1 hfl.; 194. Emilio Wainsek, Bratislava 10 gmk.; 195. Esp. Grupo Wiesbaden 60 gmk.; 196. Belga leŭtenanto Dauthine el Gellenkirchen 100 gmk.; 197. L. Fischer, Jaroslaw 50 pmk.; 198. Vidvino d-ro L. L. Zamenhof, Warszawa 100 gmk., ricevitajn de s-o Christaller; 199. Samcelano en Rumanio 14 gmk.; 200. Gefratoj Tyroler, Timiŝoara 50 gmk.; 201. G. van Heek, Hengelo 41 gmk.; 202. Theodor Müller, Berlin 20 gmk.; 203. Ir. Ojander, Helsinki 10 gmk.

Barkarolo.

(Laŭ itala melodio.)

Nokte, se en silent' dormas la mond',
Barko balancas sin sur mara ond'.
Larme sopiras mi kun arda sento,
Kanton de mia am' portas la vento:
Kor' amanta, ho knabin',
Atendas Vin!
Do venu vi al mia bark',
Kiel dum foja nokt'
Sub stela ark'!

Lunon demandas kor' pri via fid',
Mute ĝi pasas for kun moka rid'.
Je mia vok' la vent' respondas sole
Kaj tra la noktsilent' eĥas tre mole:
Kor' amanta, ho knabin',
Atendas Vin!
Do venu vi al mia bark',
Kiel dum foja nokt'
Sub stela ark'!

Julio Baghy.

*) Elparolu: Erenbrejstejn.

Legu, abonu kaj rekomendu:
la plej bonan informilon pri novaĵoj
de Eŭropo, monatan gazeton

„Nova Eŭropo“

esperanta tribuno de malgrandaj nacioj
kun „Ĉeĥoslovaka gazeto“.

Abono por 10 numeroj:

Anglio 2 ŝilingoj, Belgio 4 frankoj, Ĉeĥoslovakio
10 Kč., Danio 2 kronoj, Finnlando 20 markoj, Francio
4 frankoj, Hispanio 3 pesetoj, Holando 1 guldeno,
Italio 8 liroj, Japanio 2 jenoj, Norvegio 2 kronoj,
Svisio 2 frankoj, Usono 50 cendoj, ceteraj landoj
2 fl. svisaj.

Favoraj prezoj

por landoj kun malalta valuto. Por ŝpari afrankon
(nun pli altan) ĉiu aboninto el tiuj ĉi landoj ricevos
po 1 plua senpaga ekzemplero de ĉiu numero, (do
ĉiam du numerojn). Aŭstrio 800 kronoj, Bulgario
40 levoj, Germanio, Latvio, Litovio kaj Rusio 60
germanaj markoj, Hungario 150 kronoj, Jugoslavio
20 dinaroj, Polio 400 markoj, Rumanio 40 lejoj.

Specimena numero senpage!

Administracio kaj redakcio:
Praha II, Tešnov No 10, Ĉeĥoslovakio.

Nederlanda Esperanta Komerco- Oficejo

(Nederlandsch Esperanto - Handelsbureau)
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el
Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas
per la dissendo de cirkuleroj.

Prokuras komercajn adresojn.

Prizorgas la anoncadon en Nederlando.
Interrilatiĝas kun nederlandaj komercistoj kaj
industriistoj.

Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

Baltika Marbanejo

WARNEMÜNDE

Pensio kaj Restoracio „Erika“,
Strandweg 12a.

Luksaj loĝejoj, tre malkaraj por ekster-
landanoj (ĉar germana valuto).

Wilhelm Scheel, delegito de U. E. A.,
Telefono 147.

HUNGARA VINO.

La unuarangajn vinojn de la Tokaj-
Hegyalja-provinca Vin-Komerca
Akcia Societo, Budapeŝt, seriozaj
firmoj povas malmultekoste ricevi. Eks-
porto al ĉiuj landoj de la mondo.
— Botelvinoj. —

Informojn donas

Paŭlo Balkanyi, Budapeŝt VI,
Hajos u. 15.

La mondfama slovaka vilaĝana manlaboro!

Broderojn, iakojn, tablotukojn, puntajn kurtenojn
ktp. mi rekomendas je plej favoraj prezoj.
Okaze de mendoj oni povas pagi ankaŭ per fremdaj
valutoj.

Kun la eksterlando mi korespondas nur en Esper-
anto aŭ en germana lingvo.

Informojn petu de

D. Rakovszky, Sered, Slovakio

Zupa Bratislava.

Komercistoj! Komercagentoj! Fervoraj Esperantistoj!

Vi ĉiuj scias, ke per praktika
agado sur komerca kampo ni povas
atingi grandajn sukcesojn. Tial
tut-ekinterrilata kun ni, ĉar ni pre-
zentas al vi grandan gajneblon.

Ni ofertas al vi je fabrikkomercistoj
en propraj fabrikoj de niaj mem-
broj faritajn, unuakvalitajn, plej
novajn, facile vendeblajn




Eksport-Objektoj:

Gas-Ekbruliĝilo „Audi“, 80 000—100 000
proprapovaj ekbruliĝiloj, sen ia froto, bato
ktp. Tial nedetruibla. Anstataŭaĵoj aŭ alu-
mejoj ne bezonaj.

Biciklo-Tenilo el ligno, glata aŭ kanelita,
malhele polurita kaj unuakvalita.

Murbildoj, garantiite artmaniere pentritaj en
diversaj koloroj sur la interna vitroflanko,
laŭ ĉiuj motivoj, vere belaj. Grandeco:
6:9, 9:12, 12:16 1/2 kaj 13:18 cm.

Ingo por brosilado kun tenilo, el fero, patent-
ita, nuntempe plej efika vendobjekto.



Kontraŭ 30 gmk. ni sendos
originalajn specimenojn al
ĉiuj landoj.

Ĉiujn aliajn fabrikojn
deziratajn el Germanujo ni
peras je fabrikkomercistoj. Aldonu
al demando respond-
kuponon.

Uzu niajn servojn!

Komercista Esperanto Grupo Freiburg i. Br. (Germ.)

Katharinenstr. 14 Katharinenstr. 14



Kapablaj reprezentantoj serĉ-
ataj por ĉiuj landoj

Unuakvalitaj

Ŝtaloĵoj de Solingen:

Raziloj, Razaparatoj, Razilklingoj, Poŝ-
tranĉiloj, Tondiloj, Hartondiloj, je fabrikkom-
prezo.

Bildoj kaj originalaj specimenoj haveblaj.

Perado per

Komercista Esperanto Grupo
Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14.

Aldonu al demando respondkuponon.

Pension-Hôtel Réchemont Montreux (Svisl.)

Belega situacio. — Komfortaj ĉambroj.
Moderaj prezoj.

Sin rekomendas al turistoj kaj vizit-
antoj de Montreux.

DRAPOJN

por sinjoroj kaj sinjorinoj vi malkare
aĉetas je fabrikkomercistoj ĉe

Muthschall & K-io, Forst i. L.,
Germ. Gubenerstr. 28 Germ.

Kapablaj reprezentantoj serĉataj. — Vendo
al privatuloj.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por kores-
pondantoj, interŝanĝoj komercaj interrilatoj
aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne
enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan
nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault),
Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Libra kaj Arta Presejo

Emil Friedr. Adolph

Fond. 1888. Hassloch (Palatinato) Telef. 38

Fabrikado de bonkvalitaj artpresaj prospektoj kaj
de ĉiuj presaĵoj por komercistoj kaj industrio en ĉiuj
eŭropaj lingvoj, inkluzive Rusa kaj Esperanta

Oni petu oferton.

Korespondado: Esperante, Angle, France, Germane ktp.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchsberg 5, Salzburg.
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Fr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralovce. Otto Lumpe,
Trautenau.
Estonia: Est. Esp. Unuigo, postkast' 6, Tallinn.
Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Gerono, Rambla Alvarez 12-2.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝt VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
Litova: Paŭlo v. Medem, Sineliu-g-v-12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberroman, Krak-Przedm. 10, Warszawa.
(P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel),
Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth
Avenue, New York City.

Anoncetoj.

EDZIĜO. Eksdel. de UEA en Warszawa s-o Józef Litauer
edziĝis kun f-ino Marja Zugałewicz.

FIANCIGO. S-o Georg Gladny-Lastovsky, elektr.-ing.stud.,
Praha, kaj f-ino Karolina Herzenberg, Berlin, film. artist.,
anoncas sian fianĉigon.

EDZIĜOPETO. 20-jara fraŭlo (Esperantisto), kun forte
konservitaj moralaj kvalitoj, serĉas 16-18-jaran sinceran
amikinon en sia vivo. La materiala havaĵo ne estas
grava. Seriozajn proponojn adresu al: Boris D. Kon-
stantinov, por B. M., Pleven, Bulgario.

NAPOLI (Italio). — Ĉiuj geesperantistoj, kiuj vojaĝos aŭ
travojaĝos ilin ĉi belegan Italian urbon, bonvolu viziti la
jus starigitan sidejon ĉe „Rinascita“, Via S. Lucia 54 (Hotel
de Russie). Ili povas sin turni ankaŭ al s-o F. Cesarini
ĉe „Intendenza di Finanza“, Via Roma, Napoli.

DISERVO ESPERANTA okazos en Preĝejo de S-ta Georgo,
Hart Street, London W. C. 1, je dimanĉo, 12. marto, 3.15 pim.

ANONIMA DONACANTO de 5 ekzempleroj de ET por
aŭtoritatuloj estas avizata, ke la sumo de 500 gmk. de li
sendita elĉerpiĝos per n-o 75.

JAPANA POŝFORNO. Oni deziras aĉeti japanan poŝfornon
kaj karbo-pastelojn por ĝia varmigo. Vendistoj, sendu
prezaron al la adreso: M. Ribas de Pina, Comandante
de Arilleria, Palma de Mallorca, Hispanujo.

PROTESTO. Ni, s-oj J. Bulski kaj Jozef Zakrzewski, pro-
testas kontraŭ la misuzo de niaj nomoj en la Esperanta
gazeto. Ni estis kaj restos ĉiam fidelaj Esperantistoj.

PROTESTO. Mi publikas protestas kontraŭ misuzo de mia
adreso kaj nomo, aperintaj en gazeto „Esperantida“. Mi
ne respondas kaj ne respondos al Esperantidoj, sed nur
al Esperantistoj. — M. Chyry, str. Stodolna 14, Česlo-
chowa, Polio.

PASTRO L. W. CRONKHITE, post kvardekjara laboro, eka-
ĝis sian mistan laborkampon ĉe Bassein, Burma, en
frua aprilo, por reiri al sia usona hejmo. Nova adreso:
Greenwich, N. Y., U. S. A., kien li alvenos ĉirkaŭ la unua
de junio. Li aparte bonvenos leterojn kaj poŝtkartojn
ilustritajn montrantajn geinfanojn. Responde li sendos
leterojn kaj burmajn kaj hindujajn kartojn.

KOMERCO KUN HISPANIO. S-o Gaudencio Vazquez, str.
Jaime Vera 26, Nerva (Huesca), Hispanio, deziras kores-
pondi kun gravaj komercistoj, kiuj deziras eksporti
komercaĵojn al Hispanio.

LA PLEJ FAMAJ SONORIL-KONCERTOJ en la tuta mondo
okazas en Mechelen (Malines) apud Antverpeno en
Belgio. Petu informojn de: Inlichtingsbureau (Inform-
oficejo), Bruel 125, Mechelen.

LERNO LIBRO DE ESPERANTO POR LATVOJ kun Esp-
latva vortaro aperis (82 p., grandformato). Personoj
dezirantaj posedi ĝin en sia kolekto da Esperantaĵoj,
bonvolu sendi al la eldoninto s-o K. Strazde, Jelgava
(Latvio), Zala iela n-o 13, kvar frankojn (francajn) aŭ
la ŝufundamente verkitajn Esp. librojn je sama valoro.
Ne sendu bagatelojn!

GVIDLIBRETO DE ANTVERPENO. Sendu simplan inter-
nacionan respond-poŝtkarton al s-o Frans Schoofs, del.
UEA, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen (Belgio), por
tuj ricevi belan, ilustritan, 32-paĝan broŝuron pri la urbo
Antwerpen, sidejo de nia VII-a Kongreso.

REVENDISTOJ DE ESPERANTAĴOJ. Aperis libro „La
malbonaj flankoj de sporo“. Bonvolu ĝin mendi tuj,
ĉar estas ankoraŭ sendebla rekte el presejo, kio evitas
duoblan afrankon. — J. Vahtikeri, Luisentali 5-11, Tallinn,
Estonio.

AL MEXIN, del. UEA, Montreux (Svislando), Grandrue 63
petas jenajn personojn komuniki sian adreson: 1. s-ino
Agnes Laurens, Rotterdam. 2. f-ino Amalia Nunez,
Pampelona. 3. s-o Luigi Puppo en Italio, 4. s-o Jakob
Dembo, Jonava (Litovio). — Petegas skribi legete la
adresojn!

POŝTMARKOJ! Kontraŭ 3 svisaj frankoj aŭ 3 danaj,
svedaj, norveĝaj kronoj aŭ kontraŭ egalvaloro de samaj,
mi sendas 200 diversajn belajn poŝtmarkojn de Slovakio
kaj Hungario. — Adreso: Johano Kratochvilla, instruisto,
Sered, Slovakio.

RAPIDIĜU ALIĜI al nova (4-a) eldono de „Bes-a Adresaro
de Esperantistoj el ĉiuj landoj!“ Aliĝa kotizo: 1 sv.
fl., 6 Kč., 12 gmk. aŭ 5 resp.-kup. — Bohema Esperanto-
Servo, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakio.

SANĜO DE ADRESO. De la monato februaro mia nova
adreso estas: Stefano Pedrazzini, de Missas Pedrazzini
and Company, Arispe (Sonora, Mexico). Deziras prov-
numerojn de Esp. gazetoj kaj katalogojn.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Interŝanĝo. Sendu al mi almenaŭ 100 uzitajn, nedifektajn
poŝtmarkojn de via lando, kaj interŝanĝi mi sendos aŭ
Esperantajn librojn aŭ bonajn poŝtmarkojn de Anglio kaj
kolonioj. — Cecil C. Goldsmith, Withernsea, Yorks., Angl.

S-o Ejnar Nielsen, Brogade 4, Odense, Danujo (19-jara)
deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kaj leteroj.
S-o Lars Hansen, Sct. Jørgensgade 30, Odense, Danujo
(17-jara) deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj (bild-
flanke) kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Samideanoj, dezirantaj havi belajn papernumerojn, kiuj
ekzistas ne pli ol unu jaron, demandu kondiĉojn ĉe Paul
Belsnij, Estonio, Ambla, per afrankita respond-poŝtkarto.

Marko Campmany, str. San Francisco 67, Tarrasa, Barcelona,
Hispanujo. — Mi sendos al ĉiuj landoj 50 malsamajn
uzitajn poŝtmarkojn el Hispanlando al ĉiu, kiu volas
sendi al mi saman kvanton da pm. de sia lando, ankaŭ
malsamajn. Laŭ deziro mi sendos unue.

Paŭlo Felter, Montigny-lez-Metz, rue du Canada 2, Francujo,
deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

Rusaj sovietaj poŝtmarkoj: jubilea eldono 1917-1921, 100,
250 kaj 1000 rubl.; ĵus aperinta eldono por helpo al
malsatantoj (vidajo de Volga), gr. formato 35:55 mm,
2250 rubl., tri samvaloraj specoj: ruĝa, verda kaj bruna.
Liverado al seriozaj kolektantoj. Pago per ĉekoj kaj
naciaj bankbiletoj. — Georgo Gladky, Praha, Prihradka
454, Ĉeĥoslovakujo.

Bulgaraj poŝtmarkoj. — Ni vendas ĉiujn specojn de bul-
garaj poŝtmarkoj (50% rabato je Yvert & Tellier 1922).
Unufoje monon per bankĉekoj. Oferto „extra“ — Zjubomir
Hassakeff, Pleven, Bulgario.

Wiljo Saaristo, Viipuri, Käärlonkatu 2, Finnlando, inter-
ŝanĝas ilustr. poŝtmarkojn.

S-o J. O. Rauhala; komunuma sekretario, Viipuri, Sorvali
Kuudeskatu 17, Finnlando, deziras korespondi per poŝ-
tkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj (precipe pri komunumaj
kaj kooperativaj aferoj).

Se vi deziras profiti interŝanĝi kun ĉiuj landoj interesajn
leterojn, poŝtkartojn, poŝtmarkojn ilustr., poŝtmarkojn ktp.,
aliĝu al Internacia Klubo „Oriento“, skrynka poŝt: 110,
Wilno, Pollando. Jarkotizo: 20 germ. mk. aŭ Kč. 5 fr. fl.,
3 sv. fl., 5 pes, 2 ŝil., 1 dol., ktp.

Ludoviko Fischer, Jaroslaw, Pollando, Słowackiego 9 (16-jara)
deziras korespondi kun gejunuloj pri stenografio, bindado,
elektrotekniko k. a.

S-o Kazimierz Kosinski, Lodz, Pol., Piotrkowska 118, inter-
ŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Edmund Swiderski, Ruda Pabjanicka, Lodz, Polio,
interŝanĝas papermonon kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-ino Eugenia Nowosielska, Lodz, Pol., ul. Andrzejka 7,
deziras korespondi per leteroj pri ĉiuj temoj.

S-o Ladislao Micey, ĉefleŭtenanto, Budapeŝt, Hung., Grof
Zichy Jenő u. 45, deziras korespondi per amikaj leteroj,
ilustr. poŝtkartoj kun intelektuloj, ankaŭ kun blinduloj.

S-o Alfred Ritsch, Tallinn, Estonio, Kuninge t. 1, deziras
korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj, interŝanĝas
poŝtmarkojn.

Erich Lantzech, Große Brüdergasse 16, IV., Dresden A. 1,
Germ., deziras interŝanĝi poŝtmarkojn de ĉiuj landoj.

Franz Vaypotic, Brauk & Horst, Uferstr. 11, Germ. deziras
korespondi kun eksterlandanoj.

S-o Rudolf Grosser, Breiterweg 244/45, Zimmer 38,
Magdeburg, Germanujo, deziras korespondi per poŝ-
tkartoj ilustritaj (bfl.) kun la tuta mondo kaj interŝanĝi
poŝtmarkojn, precipe kun orientanoj kaj eksterŝanĝi
— Sendu 100 poŝtmarkojn de via lando, mi sendos 100
poŝtmarkojn de mia lando.

S-o Jose Ventura, 12, Roteros, Valencia, Hispanio, gvidanto
de kurso Universitata, deziras ricevi po unu ĉiuspeca
Esperantaĵo kaj korespondpetojn por siaj geferantoj. Li
dankos poŝtkarte.

F-ino Heda Tyroler, Timiŝoara II, Hauptstr. 44, Rumanio,
Banato, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kun
gesamideanoj en la tuta mondo.

S-o Geza Dlovzégi, fervoj-oficisto, Timiŝoara III, str.
Helvet 28, Rumanio, deziras korespondi per ilustr.
poŝtkartoj (bfl.) kun la tuta mondo.

S-o Julio Kolofon, fervoj-oficisto, Timiŝoara IV, str. Grün-
hacker 8, Rumanio, deziras korespondi per ilustr. poŝ-
tkartoj (bfl.) kun la tuta mondo.

S-o Geo Kvejlman, Lodz, Pjezd 14, Pol., deziras kores-
pondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per poŝtkartoj
ilustr. kaj leteroj, interŝanĝas monbiletojn, gazetojn k. a.

S-o Johano Varadi, Budapeŝt VI, Szondi u. 38-II-17, ne
havas ankoraŭ korespondantojn, deziras interŝanĝi ilustr.
poŝtkartojn, leterojn, fotojn kaj monojn kun ĉiuj landoj.

S-o Albert Schaeckels, Kattenberg 28, Bergherhout, Ant-
werpen, Belgio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per
poŝtkartoj ilustr. (bfl.), ne kun Germanio kaj Hungario.

S-o Osw. Wittig, komercisto, Merseburg a. S., Germ.,
Klausentor 3, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr.
poŝtkartoj kun ĉiuj landoj, precipe fraŭlinoj.

S-o Ernesto Gani, 21-jara dentisto, Timiŝoara IV, Rechte
Bega Zeile 9, Rumanio, deziras interŝanĝi ilustritajn
poŝtkartojn (bfl.) kun gesamideanoj en la tuta mondo,
precipe dentistoj.

S-o Stefano Sippay, Miskolcz, Serhaz u. 42, Hung., deziras
korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun tiumondaj gesamide-
anoj kaj serĉas laboron en eksterlando kiel preseja
maŝinisto.

S-o Stefano Girardini, Budapeŝt VII, Izabella ter 7-1-15,
ne havas ankoraŭ korespondantojn, deziras interŝanĝi
ilustr. poŝtkartojn, leterojn, fotojn kaj monojn kun ĉiuj
landoj.

Denis Dielen, Ploenstraat 1, Berchem-Antwerpen, Belgio,
instruisto, deziras korespondi per leteroj kaj per ilustr.
poŝtkartoj kun la tuta mondo.

S-o Fritiof Ahnfeldt, instruisto, Torskors, Svedio, deziras
korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝanĝi poŝ-
tmarkojn kun eksterlandanoj. Bv. fari la unuan sendaĵon!